

# RETKOMUNIKOJ 4/2009

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. KONFERENCO DE ĈEA EN LA ESPERANTO-MUZEO SVITAVY
2. LA CETERAJ INTERNACIAJ EVENTOJ ĈI-JARAJ EN ĈEĤIO
3. EKSTEREŬROPAJ EVENTOJ: ĈU KOMUNE FLUGKARAVANI?
4. JUBILEA UK EN BJALISTOKO
5. LASTA ŜANCO POR KONTRIBUOJ AL LA JUBILEA ASOCIA DVD!
6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS. (oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)
7. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANĜOJ EN ĈEĤIO AŬ ORGANIZATAJ DE ĈEĤIO

## 1. KONFERENCO DE ĈEA EN LA ESPERANTO-MUZEO SVITAVY

Konferenco de ĈEA okazos en Svitavy de la 9-a ĝis la 11-a de oktobro. Dum ĝi okazos du gravaj inaŭguroj: tuj vendrede estos inaŭgurita jam la tria ekspozicio en la Esperanto-muzeo, dediĉita al du temoj: "100 jaroj de organizita Esperanto-movado inter fervojistoj" kaj "Esperanto kaj infanoj". Komuna fadeneto por ambaŭ temoj estas arta infankonkurso kun la temo FERVOJO. Atentu, ke la limdato por la sendo de la konkursaĵoj estas fino de aŭgusto! Do bonvolu inviti viajn infanajn amikojn cxeesti. Krome estos dum la konferenco inaŭgurita DVD omaĝe al la kvardekjarigo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Pli da informoj kaj aliĝilojn al la konferenco vi trovos ĉe [http://www.esperanto.cz/index.php?id=5\\_1&jazyk=esp&id\\_akce=77#vybrana](http://www.esperanto.cz/index.php?id=5_1&jazyk=esp&id_akce=77#vybrana) , en la ĉeĥa lingvo ĉe [http://www.esperanto.cz/index.php?id=5\\_1&jazyk=cze&id\\_akce=77](http://www.esperanto.cz/index.php?id=5_1&jazyk=cze&id_akce=77) , pri la infankonkurso ĉe [www.esperanto.cz/infankonkurso](http://www.esperanto.cz/infankonkurso) .

## 2. LA CETERAJ INTERNACIAJ EVENTOJ ĈI-JARAJ EN ĈEĤIO

22.-29.8. 2009: EKOTUR 09 (Ekoturisma renkontiĝo) en Svitavy. Oni dumtage laŭinterese biciklos aŭ piedturismos en la bela ĉirkaŭaĵo kaj vespere havos komunan programon. Eblas ankoraŭ aliĝi kaj ĝui la belegan regionon kune kun jamaj partoprenontoj el Ĉeĥio, Francio, Germanio, Belgio kaj Kanado. Pli da informoj kaj aliĝiloj ĉe [www.kava-pech.cz/ekotur](http://www.kava-pech.cz/ekotur) aŭ ĉe [chrldle@kava-pech.cz](mailto:chrldle@kava-pech.cz)

29.8.2009: LABORSEMINARIO „Jak může esperanto přežít v podmínkách 21. století?“. En Muzeo de Esperanto en Svitavy inter 10-17h. Por reprezentantoj de kluboj kaj aktivaj

individuoj. Ĝi okazos en la ĉeĥa lingvo. Simbola kotizo 50,-Kč inkluzivas KD kaj kafon/teon). Pliaj informoj kaj aliĝoj ĉe Pavla Dvořáková – pavla.esperanto@gmail.com

12.(13.)9.2009 LA 3-A POSTFERIA RENKONTIĜO EN NETOLICE  
Lingvokleriga kaj kultura programo. Seminario pri tradukado de ĉiĉeronaj tekstoj. Aliĝoj kaj informoj ĉe Turk.V@seznam.cz

12.-18.10.2009: InPaSem - Internacia Paroliga Semajno. Tradicia kurso por komencintoj kaj seminarioj por jamaj parolantoj. Dobřichovice. Info: www.kava-pech.cz/inpasem aŭ chrdle@kava-pech.cz

12.12.2009 AnkRo (Antaŭkristnaska renkontiĝo) en Písek, ĉi-foje omaĝe al la 150-jariĝo de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof. Info: esperanto.pisek@seznam.cz

### 3. EKSTEREŬROPAJ EVENTOJ: ĈU KOMUNE FLUGKARAVANI?

Dum proksimaj du jaroj okazos minimume tri tre allogaj internaciaj Eventoj ekster Eŭropo:

La 95-a UK (Universala Kongreso de Esperanto) en Havano (Kubo) 2010-07-17/24

La 6-a Azia kongreso en Ulanbator (Mongolio), 2010-06-19/23

La IEK 11 (Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK) kun la temo "La ĉina saĝo" en Wuhan (Ĉinio), 2011-04-18/23.

Krome en Kubo ligo al la UK okazos pluraj internaciaj aranĝoj (i.a. la ILEI-konferenco semajnon antaŭ la UK kaj la Internacia Junulara Kongreso semajnon post la UK), kiujn eblas ankaŭ kombini kun la programo de intencata flugkaravano al la UK.

Interesatoj, kiuj pripensas partoprenon en iu el la supre nomitaj aranĝoj kaj kiuj interesiĝas pri komuna flugkaravano (aŭ almenaŭ komuna flugo), bv. sendi ajnforman interessignon al chrdle@kava-pech.cz kaj vi estos daŭre informataj pri la preparstato de eventualaj komunaj flugoj tien.

### 4. UK EN BJALISTOKO SUKCESA!

La UK en la jubilea jaro (150-a datreveno de la naskiĝo de L.L.Zamenhof) okazis en la naskiĝurbo de Zamenhof Bjalistoko. Inter 1860 partoprenantoj el 61 landoj ĉeestis ankaŭ preskaŭ kvindeko de ĉeĥaj esperantistoj, kiuj plejparte uzis la eblon aliĝi al la buskaravano organizita de AEH. La etoson de la UK vi povas ĝui ankaŭ nun en la reto, ekzemple ĉe:

[http://www.uea.org/kongresoj/uk\\_2009.html](http://www.uea.org/kongresoj/uk_2009.html)

<http://94uk.bialystok.pl/> --> menuero "Bultenoj"

<http://www.liberafolio.org/uk2009>

Kaj fotojn el la UK vi povas rigardi ĉe: <http://www.ipernity.com/group/78790/doc/show/with/5574809>

## 5. LASTA ŜANCO POR KONTRIBUOJ AL LA JUBILEA ASOCIA DVD!

Ĝis fino de aŭgusto bv. sendi proponojn de viaj kontribuoj al la asocia DVD (interesajn tekstojn, tradukojn, artikolojn, vojaĝraportojn, fotojn, sondosierojn, ĉu de vi mem, ĉu de membroj de via klubo aŭ sekcio) resp. regulantaj variecon de la asocia aktiveco en la lastaj 40 jaroj. Se la enhavo ne estos sufiĉe vasta, bunta kaj valora, estos eble ankaŭ pro tio, ĉar ĝuste VI ne kontribuis! Viajn sendaĵojn antaŭĝojas Pavla Dvořáková kaj Miroslav Malovec – datumbazo@esperanto.cz..

## 6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (OFICIALA ORGANO DE ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Historia evento finiĝis la 25-an de julio 2009 en Liberec, kie Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) okazigis la 65-an Internacian Junularan Kongreson (IJK) de TEJO, kun pli ol 330 partoprenintoj el pli ol 40 landoj (precizaj nombroj ankoraŭ ne publikiĝis). Unuafoje en historio la IJK okazis en Ĉeĥ(oslavak)io kaj la aranĝo tiel enviciĝis apud la plej prestiĝajn kiel la UK-j 1921 kaj 1996. Organizis la kongreson kvarcento da junuloj, precipe el Ĉeĥio, Germanio kaj Pollando, prezidataj de Marek BLAHUŠ.

La kongreso okazis en bloko C de la universitata studenthejmo Harcov kaj ĝia temo estis "Liberec" (vortludo pri la kongresurbo). Plurfoje la esperantistoj eliris en la publikon. Dimanĉe la 19-an de julio celebris en la urba ĉefpreĝejo sanktan meson en esperanto Miloslav kardinalo Vlk. Merkrede sur la ĉefplaco la kantisto JoMo rompis sian rekordon kantinte en 25 lingvoj dum unu koncerto. Ĵaŭde samloke okazis sukcesa Kultur-Lingva Festivalo finita per koncerto de Kimo. Samtage vespere publike koncertis en klubejo Vlak brazila esperantista rokgrupo Supernova.

Elstara estis ankaŭ la amaskomunikila laboro. Pluraj gazetoj, radiostacioj, televido kaj presagentejoj raportis pri la kongreso, eĉ ekster la limoj de la kongreslando. Plej valora estas la triminuta raporto de la germana televido ARD spektebla ĉe <http://www.youtube.com/watch?v=rwqJITm5xrM> parolata preskaŭ tute en esperanto kun germanaj subtekstoj, kiun spektis pli ol duonmiliono da germanoj. Detala listo de amaskomunikilaj aperoj daŭre kompilatas, ĝoje ni ricevos atentigojn pri aperintaj raportoj ĉe [cxej@esperanto.cz](mailto:cxej@esperanto.cz)

Spektu videoraporton pri la IJK de irlandano Benio LEWIS (en la ĉeĥa!) ĉe <http://tinyurl.com/ijk2009beniocs> aŭ vidu la paĝaron de IJK ĉe <http://ijk.esperanto.cz/> aŭ tiun de ĈEJ ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

## 7. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANĜOJ EN ĈEĤIO AŬ ORGANIZATAJ DE ĈEĤIO

En venonta numero de ĈEA-Retkomunikoj ni aperigos denove laŭeble kompletan kalendaron pri Esperanto-aranĝoj en Ĉeĥio kaj organizataj de Ĉeĥio por la resto de 2009 kaj por 2010. Ĉu ĝi estos vere kompleta, dependas de la organizantoj de unuopaj aranĝoj. Por povi aperigi la informon, mi bezonas koni jenajn indikojn: Nomon de la aranĝo, daton, lokon, retpaĝon de la

aranĝo aŭ retadreson de la organizanto, kie eblas peti pliajn informojn kaj aliĝilojn. Tiujn indikojn bv. sendi al [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz).